

Respondo de István Szerdahelyi al la dana lingvisto Henning Spang-Hannsen (2)
la 8-a kajero de la kolekto Studoj de Kultura Centro Esperantista
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 719, 1977.07.20 & 22 & 23

Parolas Claude Gacond. Pasintan semajnon ni recenzis la respondon de doktoro Istvan Szerdahelyi al la dana lingvisto Henning Spang-Hannsen, kaj ni havis la okazon mencii la lingvan gravecon de demonstro pri la diversaj signifoj de la sufikso **-ejo**. Hodiaŭ ni legas al vi citaĵojn el tiu ĉi ĉapitro de la verko *Jes, Esperanto estas vera lingvo!* de István Szerdahelyi ĵus aperinta en la kolekto *Studoj de Kultura Centro Esperantista* kiel 8-a kajero. Ni citas:

«En sia letero al Borovko, Zamenhof rakontas, kiel li eksciis pri la ekzisto de sufiksoj: foje li rimarkis sur la vendejaj ŝildoj la vortojn **konditerskaja** kaj **ŝvejcarskaja**, kaj li tuj konsciiĝis, ke en ambaŭ vortoj la elemento **-skaja** derivigis el antaŭa vorto novan, do ke tiaj elementoj povas servi kiel vort-multobligiloj. Tiu **-skaja** estis fakte sufikso en la rusa lingvo por derivi loknomojn. Verŝajne (laŭsignife), tiu estis la unua sufikso en Esperanto. Laŭforme Zamenhof elektis **-ej-** (ŝajne laŭ la germana **-ei** en **Abtei** - abatejo, **Bäckerei** - bakejo, kaj similaj). Sed en la rusa ekzistas 18 sufiksoj por derivi loknomojn ! En Esperanto estas nur unu sola : **-ej-**. Tio estas vere monotona unuformigo, se oni povus derivi loknomojn nur pere de **-ej-**, kaj se **-ej-** havus ĉiam, en ĉiu ĉirkaŭaĵo, la saman valoron.

Ni trarigardu la signifo- kaj funkcio-variantojn de **-ej-** por demonstri, ke per aliaj operacioj Esperanto tamen povas disvolvi tiun monotonecon. La valoro de **-ej-** estas **loko**, aŭ **tie**, **kie**. Tiu elemento estas konstanta. Sed tio, kio sekvas post **tie**, **kie**, jam ŝanĝiĝas, motivita far la semantika valoro de la ĉefelemento :

Unua modelo: La signifo-formulo estas **tie, kie oni –as kutime, regule**. Ekzemple : **atendejo, manĝejo, sportejo, ripozejo, promenejo** : **tie, kie oni atendas, manĝas, sportas, ripozas, promenas kutime aŭ regule**. Tiu ĉi formulo konvenas al verbradikoj.

Dua modelo: Kiam la radiko estas substantivo la signifo-formulo estas **tie, kie –as la –o**. Ekzemple : **agentejo, komisarejo, ministrejo, policejo, sekretario** : **tie, kie laboras aŭ agas agento, komisaro, ministro, policistoj aŭ la polico, sekretario**.

Tria modelo: Kiam la radiko estas adjektivo la signifo-formulo estas **loko de io –a**. Ekzemple: **densejo, sanktejo, ebenejo**: **Loko de io densa, sankta, ebena.**»

Koncerne tiujn ĉi modelojn doktoro Istvan Szerdahelyi registras klasojn kaj subklasojn da variantoj. Por la verboj li ekzemple registras du variantojn : «**Vendejo, buĉejo, forĝejo, kudrejo, kuracejo, juĝejo, muelejo, presejo** bezonas la signifo-formulon **tie, kie oni –as kutime, regule**. **Vendejo** : **tie, kie oni vendas profesie**; **buĉejo**: **tie, kie oni buĉas profesie**, ktp.

La dua varianto koncernas movoverbojn. Ekzemple: **enirejo, elirejo, pasejo, haltejo**. **Tie, kie oni eniras, eliras, pasas, haltas**. La precizigoj **kutime, regule aŭ profesie** ne konvenas plu.»

Post la analizo de ĉiuj eblaj variantoj d-ro István Szerdahelyi prezentas ilin resume en tabelo, kiun li nomas la signifo-diapazono de **–ejo**. Li trovis tridekon da variantoj. Jen ekzemplojn:

- a) loko : fajrejo = fajroloko.
b) lando : reĝejo = lando regata de reĝo.

c) urbo, vilaĝo :	loĝadejo = (urbo aŭ vilaĝo) domicilio
ĉ) teritorio :	la rezervejo
d) tereno :	tenisejo = tereno por tenisludo
e) vojo :	promenejo = promenvojo
f) domo :	punejo = pundomo
g) ĉambro :	dormejo = dormoĉambro
ĝ) salono :	koncertejo = salono por koncertoj
h) fabriko :	ŝtalejo = ŝtalfabriko
ĥ) magazeno :	juvelejo = juvel-magazeno
i) ofico :	poŝtejo = poŝtoŭfiko
j) stalo :	ĉevalejo = ĉeval-stalo

kaj tiel plu, kaj tiel plu.

D-ro Szerdahelyi konkludas : «*Tiuj ekzemploj demonstras, ke nur supraĵa kono de Esperanto igas iujn aserti, ke Esperanto estas monotone unuforma, tro regula. Tiu variaĵo, tamen, oscilas inter multe pli proksimaj polusoj ol en la etnaj lingvoj, kaj por tiu, kiu bone regas la Internacia Lingvon, ili estas dedukteblaj eĉ se ne konkrete el la komponantoj, el la karaktero de la sistemo mem.*»

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo!